# NIA PONTO


| | |
|---|---|
| Grupo Esperantista | Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.) |
| Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre | ☎ 619.694.683 (Iciar) |
| 48005-BILBAO (Hispanio) | ☎ 658.709.087 (Jesús) |
| Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es) | esperantobi@gmail.com |
| TTT-ejo: esperantobi.tk | |


**Jar-kotizoj**: Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**


**MARTO/APRILO 2012** **Nro. 91 (2/12)**


## ASAMBLEA GENERAL ANUAL.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 18 de mayo**, **a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

### Orden del día:

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2010.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2011.
4. Nombramiento de nueva Junta Directiva.
5. Informaciones varias.
6. Ruegos y preguntas.

## ĜENERALA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 18-an de majo** oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

## COMIDA DE ANIVERSARIO DEL GRUPO.

Como ya viene siendo tradición, el **sábado 19 de Mayo** celebraremos una comida para festejar el aniversario de la creación del Grupo (el 20 de Mayo hará 106 años). Estáis todos invitados, aunque deberéis **llamar, con antelación**, a cualquiera de los teléfonos que tenéis en la cabecera de esta circular.
La comida, sencilla (un menú del día, de 10 a 12 eŭros), tendrá lugar en el restaŭrante "Adrián", de Repélega (Portugalete). Familiares, amigos y simpatizantes también son, naturalmente, bienvenidos.

**LOKE ...**

## Kuriozaĵo.

Jen tiu-ĉi kuriozaĵo, kiun trovis nia amiko Pako pere de interreta navigado:

*"Servo per Amikeco"* estas la lemo de la Internacia Polico Asocio (IPA), la plej granda polica asocio en la mondo kun preskaŭ 380.000 membroj. Ĉi tie oni povas vidi la lemon en ilia devizo. La Internacia Polico Asocio estas sendependa korpo de policanoj, aktivaj aŭ emeritaj, kaj sen distingo de rango, sekso, raso, koloro, lingvo aŭ religio. Ĝia celo estas krei ligojn de amikeco kaj antaŭenigi kunlaboron. Ilia retligilo estas http://www.ipa-iac.org/

## Forpaso.



La 16-an de aprilo forpasis en Barakaldo, 81-jara, la membro de nia E-Grupo ***Juan Esteve Galán***.

De ĉi-tie ni deziras sendi niajn kondolencojn al liaj familianoj.
Ke li pace ripozu!

## Hispana Kongreso.

Inter la 27-a de aprilo kaj la 1-a de majo okazis en Almagro (Regxa Urbo/Ciudad Real) la hispana kongreso de Esperanto.



Tien veturis 4 membroj de nia E-rondo (*sur la apuda foto, en “Campo de Criptana”, sub statuo de Cervantes, Jesús M. García – Eduardo Larrouy – José L. Bringas – Iciar Arteche*).
Vere interesa kaj ricxenhava programo, kiu pretigis diversajn teatrajxojn kaj ekskursojn, prezentado de libroj, ateliero pri astronomio, presentado de la grava projekto “Bitoteko”.. Alie, nia amiko Tonjo del Barrio estis elektita por plua kvarjara periodo kiel Prezidanto de HEF.
Nur unu afereto malhelpis la kongreson: diablan vintran malvarmon akompanis nin dum la tutaj tagoj, kune kun daura pluvo. Gxis la venonta jaro ie.

## KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

5/8 apr. 2012. Iberia Renkontiĝo, kune organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, kastelurbeto Sezimbro (Sesimbra).

27 apr./ 1 maj. 2012. 71-a Hispana Kongreso. Almagro (Ciudad Real).

16/20 julio 2012. 9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Galivo, Irlando.

28 jul/4 aŭg. 2012. 97-a Universala Kongreso en Hanojo.




11 – 18 aŭg. 2012. Kongreso de SAT en Jalta, Ukrainio!
rete: jefim_z@mail.ru; skajpe terano37

18/25 aŭg. 2012. 79-a Itala E-Kongreso. Mazaradelvalo (Sicilio).

6 - 13 okt. 2012. 20a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Cambrils (Tarragona). Inf.: luis_serrano@ya.com

julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando.

### IJK-2012 ne okazos en Japanio.

TEJO tre bedaŭras la anoncon ke en la jaro 2012 IJK bedaŭrinde ne okazos en Japanio. Kelkaj ŝanĝoj de la ejo, de la organiza teamo kaj manko de volontuloj helpi kunorganizi estas validaj kialoj pro kiuj ni devis akcepti la rezignon.

Amikoj el Japanio petas sinceran pardonon kaj esperas ke tamen venos tempo, kiam ili povos plene sukcese organizi IJKn.

*(Tina Tiŝljar, estrarano pri kongresoj de TEJO).*

## Ĉu SAT-kongreso en Madrido?.

Dum kunveno de SATeH ene de la hispana kongreso de Almagro, oni pridiskutis la eblon organizi SAT kongreson en Madrido por 2013, kies plano estos komunikita dum la ĉijara kongreso okazonta en Jalto, aŭguste de 2012. Jam oni faris demarŝojn, ĉefe rilate al kongresejo-loĝejo. Ĝi nomiĝas la "Johnny", kromnomo de "Colegio Mayor Universitario San Juan Evangelista" ampleksa universitata rezidejo fama pro sia riĉa kaj avangarda kultura aktivado.

Dum posta komuna tagmanĝo, oni skizis simile eblojn por ekskursoj (tuttaga al Toledo, duontagaj tra Madrido, postkongresaj al Avilo, Segovio, Aranĥuezo ktp) kaj eblon eldoni, fare de iu pristudota instanco, antologion de traduko de hispanlingvaj revoluciaj poemoj.

*("Kani". 06/05/2012)*

**H.E.F.**

## Nova retejo de biblioteko Juan Régulo.

La retejo de Biblioteko Juan Régulo sendependiĝis de la ĉefa HEF-retejo. Ni invitas vin konatiĝi kun ĝi kaj profiti ĝiajn servojn.
Jen la ligilo: www.esperanto.es/biblioteko

*(Ana Manero. 21/03/2012)*

## Bibliografia ekspozicio pri Esperanto en la Nacia Biblioteko de Hispanio.

Okaze de la 125-jariĝo de Esperanto, la Nacia Biblioteko de Hispanio organizis bibliografian ekspozicieton pri Esperanto, kiu enfokusiĝas sur la esperantaj eldonitaĵoj aperintaj nialande.

La ekspozicio okupas la kvar vitroŝrankojn situantajn inter la halo de la Biblioteko kaj la ĉambreto kiu donas eniron al la ĉefa lego-salono. Oni aliras ĝin per la ĉefa enirejo, sed bezonatas havi leganto-karton. Tamen, akiri ĝin estas tuja kaj senpaga. La ekspozicio daŭros ĝis komence de majo. Vizitu ĝin se vi troviĝas en Madrido dum tiu tempo! (Vi povas profiti por konatiĝi kun la bela lego-salono de la biblioteko -ĉar vi jam disponos la bezonatan karton-, aŭ por viziti aliajn interesajn ekspoziciojn).

Ĉi iniciato de la Nacia Biblioteko ja dankindas, ĉar ĝi helpas diskonigi la verkojn, kiujn en Esperanto aŭ pri Esperanto oni eldonis en Hispanio.

Cetere, en 2012 oni jubileas ankaŭ la 300-jariĝon de la Nacia Biblioteko, bona okazo por sendi al ĝi gratulon pere de *Facebook* aŭ *Twitter* pro ĝia datreveno kaj pro la iniciato en rilato al nia lingvo. Ne hezitu fari, la organizantoj atendas lavangon da reagoj!

Jen kelkaj rilataj ligoj:
Bibliografiaj ekzpozicioj de la Nacia Biblioteko:
http://www.bne.es/es/Servicios/InformacionBibliografica/ExposicionesBibliograficas/index.html
Nuna ekspozicio: 125 jaroj da esperanta kulturo:
http://www.bne.es/es/Servicios/InformacionBibliografica/ExposicionesBibliograficas/ExposicionesBibliograficas2012/index.html
300-jariĝo de la Nacia Biblioteko: http://www.bne.es/es/Tricentenario/
La Nacia Biblioteko en *Facebook*: http://www.facebook.com/bne
La Nacia Biblioteko en *Twitter*: http://twitter.com/#!/bne_biblioteca

*(Ana Manero. 22/03/2012)*

## Fernando de Diego reaperis.

Same kiel "Cid Campeador", Fernando de Diego REAPERIS:

http://www.ipernity.com/blog/kantea/385501?t=81419&c=1&s=edit

La libro, deka volumo de la libroserio "Hispana literaturo" estos prezentata en la Hispana Kongreso en Almagro.

*(KantEA. 09/04/2012)*

## Koruso “Esperanto”.

Pedro Azpeitia atentigis ke en la reta ĵurnalo http://diagonalperiodico.net aperas anonceto / ligilo kiu kondukas al retpaĝo de ACNUR (la Agentejo de UN por la Rifuĝintoj). Ĝia kurta adreso estas: http://tinyurl.com/d5wzctd

En ĝi oni anoncas koncerton por venonta sabato 21 Aprilo en la madrida Paroĥejo San Matías, strato Mar de Bering, 12, metroo Mar de Cristal (distrikto Hortaleza).

En tiu bonfara koncerto, por kolekti monon por la ekzilitoj de Somalio, ludos la muzikpecon "Gloria", de Vivaldi, la Koruso Esperanto kaj la Koruso Fernando de los Ríos, kun ĉambra orkestro.

Ĉu Koruso Esperanto estas la sama ol Verda Stelo, aŭ ĉu temas pri alia kiu prenis la nomon de nia lingvo ?

*(Darío Rodríguez. 19/04/2012)*

## Simpatia novaĵo.

Jen ligilo al simpatia novaĵo pri premio al "Trio Esperanto" en la Universitato de Cuenca. Aperas du fotoj pri la grupo. Gratulon al la tri belaj virinoj!

“El grupo conquense Trío Esperanto gana ex aequo el concurso de ...
El Campus de Cuenca acogió este miércoles la final del 'I Concurso de Grupos de Cámara Universitarios', celebrada en el Salón de actos 'Luis de Molina' del ...
www.vocesdecuenca.com/.../Trio-Esperanto-Y-Chocolat-Brass...

*(Anthony Sarm Dom. 21/04/2012)*

## Muzeo de Esperanto en “ABC”.

Vidu en: http://www.abc.es/agencias/noticia.asp?noticia=1151224

*(Toño del Barrio. 23/04/2012)*

### Estudiosos aseguran que el esperanto es "una lengua viva, que funciona".

El 71 Congreso Español de Esperanto, que se ha celebrado estos días en Almagro (Ciudad Real), ha puesto de relieve que el esperanto es "una lengua viva, que funciona", a pesar de que muchas personas, por desconocimiento, consideran que es "un sueño del pasado".

Así lo ha señalado hoy el presidente de la Federación Española de Esperanto, Jose Antonio del Barrio, durante la clausura del congreso, que ha reunido desde el pasado viernes a cientos de estudiosos de esta lengua de varios países.

Del Barrio ha subrayado que "Internet y la espectacular expansión de las nuevas tecnologías de la información han atraído hacia el esperanto a muchos jóvenes”. Y ha agregado que "muchos de estos nuevos hablantes de esperanto lo hacen al margen de las asociaciones, clubes y federaciones clásicas", lo que impide cuantificar el número de hablantes que existen en el mundo.

En cualquier caso, ha señalado que se estima que unos dos millones de personas lo hablan ya en el mundo, por lo que se trata de "una lengua viva, que funciona" y no "un sueño del pasado".

*(“El Norte de Castilla”. 01/05/2012)*

## TRA LA MONDO ...

## **Nova filmo-projekto**.

Mi skribas por konatigi al vi mian novan filmo-projekton "La Plejpleja Festivalo". Se vi havas 10 minutojn, mi petas vin bv. rigardi ĝin kaj disvastigi inter viaj geamikoj - ĉiuj iloj por tio troviĝas tie.

Vi povas fari kontribuojn, elekti rekompenson aŭ simple sekvi la novaĵojn pri la projekto. Se sufiĉe da ni apogos ĝin, ni povos realigi "La Plejpleja Festivalo".

http://www.indiegogo.com/kef2005?a=460344&i=emal

*(Rogener Pavinski (pere de Jorge Camacho). 02/04/2012)*

## **Komitato por proponi la kantadon de la Eŭropa Himno en E-o**.

La 1-an de aprilo 2012 komencos funkcii la nova EU-instrumento, ke 1 miliono da subskriboj en almenaŭ 7 EU-Membroŝtatoj devigos la Europan Komisionon doni seriozan konsideron al iu ajn propono de la civitanoj, detaloj ĉe http://eur-lex.europa.eu/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=OJ:L:2011:065:0001:0022:ES:PDF. La Komisiono ne estas devigata akcepti proponon, sed ĝi devos publikigi la kialojn ke ĝi ne akceptis.

EEU jam preparis proponon kadre de tiu nova iniciato por rekomendi la kantadon de la Eŭropa Himno en EO. Ni devas prezenti al la Komisiono komitaton de 7 EU-civitanoj kiuj loĝas en 7 diversaj EU-landoj. La estraro de EEU multe diskutis tion dum la lastaj monatoj, kaj konkludis ke bonus havi 1 homon el ĉiu el la 6 ‘grandaj’ EU-landoj en la Komitato.

*(Seán Ó Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio. 25/03/2012)*

## **Pétition Espéranto : déjà 20.000 signataires - Campagne présidentielle**.

Campagne pour l’option espéranto au bac. http://esperanto-au-bac.fr

“L’espéranto est une langue vivante, pratiquée à travers le monde par de nombreuses personnes dans de nombreux domaines culturels ou scientifiques.

Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l’espéranto est un outil d’échange particulièrement efficace entre toutes les cultures. Neutre, l’espéranto répond aux idéaux démocratiques de dignité et d’équité, fondés sur la Déclaration des Droits de l’Homme. Pour ses valeurs humanistes il est reconnu par l’Unesco qui « note les résultats obtenus au moyen de l’espéranto dans les échanges intellectuels internationaux et pour le rapprochement des peuples. »

L’étude de l’espéranto fait aimer, facilite et accélère l’étude des autres langues. Ainsi il favorise le plurilinguisme.

Pour toutes ces raisons nous demandons que l’espéranto soit ajouté à la liste des langues admises en tant qu’option au baccalauréat.

*(Anthony Sarm Dom. 03/04/2012)*

## **Reta PIV fine aperos**.

http://www.liberafolio.org/2012/reta-piv-fine-aperos

*(Francisco Javier Moleon. 03/04/2012)*

## **Subtitolita en Esperanto**.

La Vatikana Televido aperigis en Youtube filmon kun la paska diskurso de Papo Benedikto la 16a, subtitolita en pluraj lingvoj, interalie en Esperanto.

Oni devas kliki sur malsupra ruĝa butono "cc" kaj aperos menuo kun la lingvoj disponeblaj por subtitoloj. Kliku sur Esperanto aŭ iu ajn alia:

http://www.youtube.com/watch?v=QyB8oEIWh0s

*(Darío Rodríguez. 11/04/2012)*

## **Titanic**.

En la subakviĝo de la fama ŝipo Titanic, la 14an Aprilo 1912, pereis la fama esperantisto William Thomas Stead.

Legu: http://www.ipernity.com/blog/porkido/382329

(Signalita en SCE far Carlo Sarandrea, redaktoro de Vatikana Radio Esperanto)

*(Darío Rodríguez. 16/04/2012)*

Pri tio, kun interesaj konsideroj pri Stead, iam verkis Javier Guerrero en sia blogo: http://enesperantujo.blogspot.com.es/2010/11/un-esperantista-en-el-titanic.html

Tre rekomendinda.

*(Toño del Barrio. 16/04/2012)*

## **Por filatelistoj**.

La plej novaj varoj ricevitaj de la Libroservo de UEA:

Nederlando: Poŝtmarkoj Esperanto 125, Filatelaĵoj, 2012. Bloko de dek unuaklasaj (enlandaj) poŝtmarkoj eldonita okaze de la 125-a datreveno de Esperanto. Prezo: 6.00 EUR. Pliaj informoj, reta mendilo: http://katalogo.uea.org?inf=8804

*(Darío Rodríguez. 21/04/2012)*

### **Sistema de traducción automática**.
### **Google Translate cumple seis años con espectaculares resultados**.

Google Translate, el servicio online para traducir palabras y textos, cumple hoy, sábado, 6 años, contando con la friolera de 200 millones de usuarios activos mensuales.

Pese a unos comienzos difíciles en el desarrollo del servicio de traducción, Google Translate, donde apenas existían 8 idiomas para traducir, poco ha poco fue ampliando el número de idiomas y la calidad de las traducciones y, sobre todo, la velocidad, logrando ya en 2006 traducir una frase en menos de un segundo. Entonces, el 28 de Abril, lanzaron el primer idioma a traducir, ampliando poco a poco el catálogo, llegando en la actualidad a la capacidad de poder traducir entre 64 idiomas diferentes, incluyendo algunos poco comunes como el **esperanto**, swahili, bengalí y el yiddish.

*(Kaptita el Interreto. 28/04/2012)*

## Evoluo de la membrostatistiko de UEA.

Kiel montris la statistiko en la aprila "Esperanto", en 2011 UEA havis 5321 individuajn membrojn, t.e. 33 pli ol en 2010. La ĉi-jara evoluo estas zorgiga: la 30-an de aprilo estis 4345 membroj, t.e. 268 malpli ol je tiu dato en 2011. Se ni lasos la evoluon dependi sole de la (re)membriĝemo de tiuj, kiuj ankoraŭ ne kotizis por 2012, ni riskos, ke la fina nombro ne atingos 5000 ĉi-jare.

Jen la aprilaj nombroj en unuopaj kategorioj (interkrampe aprilo 2011): Membro kun Gvidlibro 260 (251), Membro kun Jarlibro 1039 (1184), Juna MJ 164 (148), Membro-Abonanto 1869 (2004), Juna MA 72 (71), Dumviva Membro 779 (795), Juna DM 13 (15), Dumviva Membro kun Jarlibro 82 (76), Juna DMJ 7 (9), Honora Membro 53 (53), Honora Patrono 7 (7).

Preskaŭ ĉiu lando estas ankoraŭ sub la pasintjara nombro. La plej grandaj minusoj estas en Francio (117), Rusio (61), Italio (56), Usono (52), Brazilo (47), Svedio (45), Hispanio (36), Belgio (33), Finnlando (31), Pollando (31), Germanio (25), Litovio (25), Britio (24), Nederlando (24) kaj Hungario (23). Nur du eŭropaj landoj jam havas pli da membroj ol fine de 2011, nome Grekio kaj Islando (po +2). Eble la nova kresko de UEA postulas, ke ĉiuj eŭropaj landoj unue bankrotu.

*(Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA. 03/05/2012)*

## AIS-kursoj libere alireblaj per educado.net.

Dum la Malferma Tago okazinta en la CO pasintsabate (kiun partoprenis preskaŭ la tuta Estraro de UEA) okazis pluraj gravaj decidoj i.a. rilate AIS-kursoj:

Dum limigita tempo du retkursoj de AIS en http://edukado.net/klerigejo estos libere alireblaj. Temas pri astrobiologio (3 lecionoj) de A.Wandel, kaj Interlingvistiko (10 lecionoj) de V. Barandovská-Frank. La du kursoj estas malfermitaj por ekstera publiko, oni povas ilin senpage sekvi. Pro teknikaj kialoj necesas tamen membriĝi ĉe la paĝaro edukado.net. Kiu volas ke liaj au ŝiaj rezultoj kaj progreso estu registritaj, povas peti enlistigon ĉe la adreso AIS-kurso@edukado.net.

*(Amri Wandel, Estrarano pri Scienca kaj Faka Agado de UEA. 07/05/2012)*

## Ĉu vi volas legi E-revuojn de la tuta mondo?

Vi nur bezonas viziti jenan TTT-ejon: http://www.gazetejo.org/eo/gazetoj?page=3

## NO LO OLVIDES!!!

El **viernes 18 de Mayo**, Asamblea General de socios en el Grupo.

El **sábado 19 de Mayo**, comida para celebrar el aniversario de la fundación del Grupo (ya 106 años) en un restaurante de Portugalete. El precio será económico.

### ¡Os esperamos a todos!